



FLANDRA ESPERANTISTO

MONAIA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

ENHAVO :

La 1a. Flandra Kongreso de Esperanto okazos en Antverpeno dum Pentekosto 1930. — Naskiĝis infaneto. — Kristnaskovespero. — Inter ni. — Gepatroj. — La Graveco de la Flandra lingvo. — La Admirinda Mussolini. — Subteno por nia revuo. — Internacia Esperanto-Muzeo, Wien. — Neprilaborita Fruktozona Kampo por la Flandraj Esperantistoj. — Diversaĵoj. — Esperanto door Zelfonderricht. 5^{de} Les. — Bibliografio.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

La 1a. Flandra Kongreso de Esperanto okazos en Antverpeno dum Pentekosto 1930.

(la 7an.8an. kaj 9an. de Junio).

FLANDRA KANTO ESPERANTIGITA.

NASKIĜIS INFANETO...

Teksto

de Prosper Van Langendonck

Muziko

de Joris De Bom

Al mia muzikama amiko Aug. Faes.

La Tradukinto.

Vesper' silenta, vesper' malhela
Sur kamp' de Bethlehem'.
Ne voĉ-susuro, ne brilo stela
Sur kamp' de Bethlehem'.
Subite trilis ĝojopsalmoj
Kaj dolĉe kantis ĥor' anĝela:
Naskiĝis infaneto, infanet' ĉiela!

Safistoj serĉis en ĝoj' atenda
Al stal' de Bethlehem'.
Jezuon gloris per kor' malplenda
En stal' de Bethlehem'.
Eksaltis kor' pro pura ĝojo:
Vivu l'Mesio elektita.
Ĉar estas infaneto, infanet' nas-
[kita.

Tri saĝaj reĝoj iradis ĉiam
Sur voj' al Bethlehem'.
Montriĝis brile per stelo tiam
Al ili Bethlehem'.
Genuis ili adorante
Kun don' aroma kaj trezora.
Naskiĝis infaneto, infaneto glora.

Ni ĉiam aŭdas la psalmojn trili
En sankta Bethlehem'.
Ankoraŭ vidas la stelon brili
Sur sankta Bethlehem',
Al kiu la animo celas
En kiun la feliĉ' eniĝis.
Ĉar tie infaneto, infanet' nas-
[kiĝis.

Tradukis H. VERMUYTEN.

Kristnaskovespero

de Lode Baekelmans (*)

*Kaj veninte en la domon, ili vidis
la knabeton kun Maria, lia patrino,
kaj kliniĝinte ili riverencis al li, kaj
malferminte siajn trezorojn prezentis
al li donacojn, oron kaj incenson kaj
mirhon.*

Evangelio laŭ S. Mateo.

Cap. II.-II.

Neĝado ĉesis, kaj la stratoj purblanke brilis sub la reheliginta ĉielo plena de steloj ĉirkaŭ la luno lumanta.

Vento pikanta suprenpelis la polvan sablon briletantan, siblis tra la telefonretaĵo, blovis super la tegmentoj... Ne estis alia bruoj en la stranga vespero.

Du homoj solece iris tra la stratoj. Ili renkontis unu la alian en trinkejo, la finna maristo kaj la juna poeto. La Finno, multepeza fortikulo, marŝis balanciĝante apud la vigla, blonda, aventurema junulo. Kristnaskotrinkaĵo kaj iom da havenangla lingvaĵo kunigis ilin. Ĝstis pli agrable vagi kune en la ŝipista kvartalo, kvankam la vortoj estis maloftaj kaj nekompletaj.

En la Paŭlostrato ili haltis antaŭ la pordo de trinkejo. Sur la fenestro ili legis la surskribaĵon: „Trokadero.” Sonoris la dekunua sur la turo.

— Ĉi tie? demandis la Finno.

— Ĉarmaj knabinoj, diris la Poeto.

La „Trokadero” ne similis al vasta palaco! Starigita ĉe la stratangulo, la domo estis malvaste konstruita ĉe la malantaŭa flanko de la policejo...

La trinkejo estis granda kiel antaŭtuko, bufedo kaj du tabloj apenaŭ lasis lokon por la gastoj. La forneto zumegis kaj la gaslumo gaje brilis. La Poeto metis branĉeton da mimozoj kaj fasketon da violoj sur la blankan marmoran tablosupraĵon. La florojn li aĉetis vespere de florvendingistino kun dolĉaj okuloj. La Finno ekbruligis malhelan cigaron kaj mendis du glasojn da „stout” al la komplezema servistino en bluzo ruĝa...

(*) *LODE BAEKELMANS* naskiĝis en Antverpeno en la jaro 1879 kaj estas unu el la plej famaj nuntempaj flandraj verkistoj. Li pentras laŭ la realeco, sed ne forigas la humoron. Li estas subestro de l'Antverpena ĥopolbiblioteko, kies katalogo enhavas apartan Esperantan fakon kun pli ol 400 libroj. Ĉe la eldonejo „La verda Velo” aperos baldaŭ de li „Elektitaj Noveloj,” tradukitaj de Jan van Schoor.

Gajeme la brunhara Ida staris malantaŭ la bufedo kaj parolis anglan lingvon, miksitaj kun brusela ŝerco.

— Bela kristnaskovespero, ŝi diris, neniu homo en la strato... Malbone por la aferoj...

— Nu jes, respondis la Finno.

— Estas belege ekstere, rimarkigis la Poeto, belega blanka kristnaskonokto; la urbo estas senbrua, blankoplena kaj arĝentoluma.

— Jes, kapsignis la Finno, kiu komprenis neniun vorton, ĉar la Poeto nun parolis flandre.

— Kun kia stranga homo vi estas nun? demandis Ida.

— Poeto de la finnaj lagoj... fama homo el la Nordo!

— Bah! Poetoj ne havas monon, malestime diris Ida.

— Ne ofendu nin, aminda virino!

— Ŝerculo!...

— Sailor?

— Yes, miss Ida!

Ŝi verŝis por si mem glaseton da likvoro kaj venis eksidi apud la maristo, sen komplimentoj, ĉar tiel konvenis.

— Ĉu vi faris longan vojaĝon?

— Yes!

— Apenaŭ maldungita?

— Yes!

— Kia estas via nomo, darling?

— Melhioro!

— Kiel vi renkontis unu la alian?

— Renkontis amikon en trinkejo... promenis kune!

— Prosit!

— Prosit!

La Poeto revante rigardis la ĥin-jn ventumilojn ĉe la muro kaj poste sian krudan konatulon, kiu mallerte amindumis la gajan servistineton.

Grumblante aperis Baltazaro, la armena tapiŝvendisto, ĵetis senzorge sian paketon teren, mendis glason da limonado, dum li alŝovis sian seĝon apud la forneton. Li tremis en sia dika vintrovesto, ŝovis sian turkan ĉapeton en la kolon, gratis la korvonigrajn harojn.

Liaj malhelaj okuloj brilis en la bruna osta vizaĝo.

— Malbona vetero, li sopiris, no people... no business...

Li ne klopodis rekomendi siajn tapiŝetojn. Ili kuŝis aŭpud li, multkoloraj figuretoj sur griza fono, tra kiu oraj fadenoj ĉie trapasis. Malvarmiĝinte li frotis siajn ŝuojn ĉirkaŭvolvitajn per bluaj tukopecoj, kiuj elŝoviĝis el lia vinruĝa, mallonga turka pantalono.

— Estas malvarma vetero, asertis la Finno.

— Tre malbona vetero, ĵesis la Armeno, no business...

Ida duonkantis gajan francan kanteton.

Tiam venis Paŭlino, la dika blonda trinkejestrino, el la ĉambreto super la kelo.

— Abend, ŝi kriis sur la ŝtupareto.

— Abend, Paŭlino!...

— Ho, jen estas Gaspardo, la poeto!... Bona Dio, kiel longtempe vi forestis... Kaj Baltazaro tie sidas tiel trankvile...

— No business...

— Ne, keine Geschäfte!... Ĉu ankoraŭ neĝas?

— Ne, Paŭlino, sed la stratoj estas virge blankaj...

— Nu jes... virge...

— Mi prezentas al vi mian amikon Melhioron, la plej faman poeton el Finnlando; mi konatiĝis kun li en suspektinda akompano je dudek-tri minutoj post la oka apud la Karborivereto!

— Schwaermer!

— Tiaj estas ja la poetoj, altestimata Paŭlino!... Ĉu ni nun ne trinku agrablan punĉon en la malantaŭa ĉambro?...

— Tio ne estas ebla hodiaŭ, decide diris Paŭlino.

— Ne, ne en la malantaŭa ĉambro, certigis ankaŭ Ida.

— Estas tiel agrable tie, insistis la Poeto.

— Estas tute ne eble...

— Kial ne?...

— Naskiĝis tie infano, flustris Paŭlino, anĝela infano.

— Tie en la ĉambro? demandis la Finno.

— Jes!...

— Infano... malrapide diris la Poeto, infano? Al kiu apartenas tiu infano?

— Al mia fratino Mario... ŝi kuŝas sur la kanapo, kaj la lulileto staras apud ŝi.

— Estas sana knabo, memkontente diris Ida. Paŭlino kaj mi faris ĉion sen kuracisto kaj akuŝistino.

— Nun ili dormas, rakontis Paŭlino, karese kaj patrine; mia mal-feliĉa fratinetino... ankoraŭ tiel juna kaj jam en zorgoj... se mi estus havanta tiun infanon...

— Aŭ mi, diris Ida, sed ŝi mem estas ankoraŭ infano!

— Kiam ŝi skribis al mi, ŝi estis senespera. Estis neeble sciigi pri la gepatrojn, ili estas tiel honestaj, ili ne scias, ke mi havas ĉi tie trinkejon... Ili pensas, ke mi estas guvernistino. Mi invitis ŝin viziti min... Kiam ŝi estis ĉi tie, mi skribis al la patrino, ke Mario devos resti iom por anstataŭi min, ĉar mi, post grava malsano, bezonas ripozon kaj kuraĝigon. La fianĉo de Mario servas en la armeo... ili baldaŭ edziĝos, kiam finiĝos lia soldateco, kaj tiam ili povos konfesi ĉion... La infaneto restos ĉi tie sed ŝi post nelonge reveturos... La infanon mi edukigos en la kamparo!...

— Romano, kortuŝite diris kun rido la poeto.
— Ne romano, neis Paŭlino, la ĉiutaga vivo...
— Mario estas sensperta, brava knabino, revis Ida.
— Tio estas knabo, rekomencis Paŭlino, li multe similas al sia patro se oni povas juĝi laŭ la portreto.

— Ĉu ni povas vidi la infanon? timeme demandis la Finno.
— Ne, ne!...
— Nu, Paŭlino, lasu nin vidi la infanon, petis ankaŭ la Poeto.
— Sed ili dormas!
— Ni estos tute senbruaĵ... nur iomete rigardi, insistis la Poeto.
— Venu do, diris hezite Paŭlino, sed ne forgesu, ke infano naskiĝis. Ili iris al la malantaŭa ĉambro trans la ŝtupetojn... Paŭlino kaj Ida antaŭe, la peza Finno kaj la altkreska poeto malantaŭe.

Lampeto radiis sub la papera ŝirmilo, kaj ombro estis en la anguloj. Sur kanapo kuŝis la juna patrino, pala en la ornamaĵo de siaj maligitaj blondaj haroj... Apud ŝi staris la salika lulileto, en kiu kuŝis la infaneto, roza misteraĵo meze de blanka tolaĵo... Ili retenis la spiradon kaj rigardis al la patrino kaj al la infano.

Sur la tablo, en vinglaso, floris rozo. „La rozo de Jeriĥo,” pensis la poeto.

Hezitante kaj senhelpe staris la Finno kaj serĉetis en sia poŝo. La virinoj solene kaj dolĉege rigardis; el iliaj okuloj radiis io mirinda. La poeto sentis sin moligita de profunda emocio kaj ĉio alia senvaloriĝis pro la sankta miraklo de la vivo.

Li metis sian branĉeton da mimozoj kaj sian bukedeton da violoj en la lulileton, reiris en la ombron. Timeme la Finno antaŭen paŝis kaj igis ruli brilantan, oran funton apud la florojn.

Honteme la ledvizaĝa Armeno staris sur la sojlo de la pordo, ŝteliris ĝis la lulileto kaj donacis tuketon, grandan kiel naztuko, multkoloran objekton.

Dum momento ili ne sciis kion fari... Neniu vorto estis parolata, sed silentante ĉiu havis sian propran, noblan humoron.

La ruĝaj pugnetoj kaj la vizaĝeto de la naskito, la dormetanta patrino ravis iliajn rigardojn.

Tiam ili reiris sur la piedfingroj. Baltazaro, la armena tapiŝvendisto, Melĥioro, la finna maristo, Gaspardo, la juna Poeto, Paŭlino, la dika estrino el la havena trinkejo, kaj Ida, la brusela servistinetino.

Ili reokupis sian lokon, la Armeno apud la forno, la triopo ĉirkaŭ la tablo, la estrino malantaŭ la bufedo. Senparolaj ili restis, la Finno suĉis sian cigaron, la poeto sian pipon, la Armeno sian cigaredon. Ida gustumis sian likvoreton, kaj Paŭlino frotis la pudrilon sur ŝia ronda vizaĝo.

Subite kantis la haveno. La vaporŝipoj grumblis kaj fajfegis, stranga bruega muzikaĉo, harmonika ludo kaj voĉoj rebruis el la silento.

— Happy Christmas!...

Paŭlino estis malkorkinta botelon, verŝis ŝaŭmvinon en la glasojn.

— Por la knabo, tostis la Finno.

— Por la patrino, diris la Armeno.

Per unu fojo la glasoj estis malplenigataj.

— Nun ni foriros, diris la poeto.

Baltazaro butonumis sian veston kaj reprenis siajn tapiŝojn. Melhioro ekbruligis novan cigaron, dum la poeto jam estis malferminta la pordon.

Ekstere ĉiu iris sian propran vojon post mallonga saluto.

Ili iris en malsamajn direktojn, sur la neĝo, tra la vento akra, sub la lunlumo, kiu malsuprenradiis el la klara stelĉielo.

La poeto malrapide vaĝetis tra la blua blanko, kiu brilante ĉie kuŝis. Li ne sentis malvarmon, aŭ la pikadon de la vento, li vidis ĉion pura kaj blanke kovrita per arĝentlumo. Li pensis pri la infano, kiu naskiĝis en la malantaŭa ĉambro de la trinkejo, pri la sensperta patrino, pri la brilantaj virinokuloj kaj pri la fremduloj kaj ilia honoraprobo al la vivo.

Tradukis Jan VAN SCHOOR.

INTER NI.

El Sta. Nikolao. „*Al Triumfo.*” — La grupo regule kunvenas ĉiu-vendrede akurate je la 8 a. Multaj novaj gelnantoj sekvas la kurson; ankaŭ la abonantaro de nia „*Flandra Esperantisto*” ĝojige kreskas. Laŭkutime okazos Kristnaskofesto; ni jam de nun tutkore invitas niajn geamikojn. La festo okazos verŝajne dimanĉon la 29 an. de Decembro je la 5 a. Detaloj sekvos.

El Antverpeno. — *La Rekta Vojo.* — Nia grupo havas novan ejon: ni nun ĉiusabate kunvenas en la salonoj de la kafejo „*De Kroon,*” Sint-Jakobsmarkt, 14. Nia kunvenejo estas vera edeno: bela fortepiano, bona biero, ludiloj ĉiuspecaj, estas je la dispono de la membroj. Kelkaj anoj de aliaj grupoj jam vizitis nin en nia nova ejo, precipe okaze de la parolado de S-ro Lodema.

Flandrema Grupo Esperantista. — Du kursoj okazas regule ĉiu-merkrede gvidataj de F-ino Martha Vervloet kaj S-ro van Schoor; la gekursanoj studas fervore kaj certe ili ĉiuj iĝos bonaj esperantistoj. La kunvenoj estas ĉiam ĉeestataj de ĉirkaŭ 20-30 personoj, kiuj ĉiuj partoprenas la diskutojn pri la aferoj de la grupo. Multaj fremdaj samideanoj vizitas niajn kunvenojn kaj laŭdas la bonan spiriton regantan en nia grupo. Laŭ oni sciigis al ni fondiĝos baldaŭ Flandremaj Grupoj en aliaj lokoj de Flandrujo. Al niaj novaj duoblaj samideanoj: bonan sukceson kaj ne forgesu, ke ni ĉiam estas pretaj por helpi vin. — *Mart.*

GEPATROJ.

La Sankta Nikolao- kaj Kristnaskofestoj alproksimiĝas! Ili estu por niaj infanoj ĝojaj festoj.

Ne donacu: ludilojn, kiuj memorigas la teruran militon; ne vestu la infanojn per soldatvesto; ne metu pafilon en ilian manon; ne lasu ludi ilin kun soldatetoj aŭ fortikaĵoj; donacu nek librojn, kiuj laŭdas la militon, nek bildojn kun militaj okazintaĵoj.



**EERST HET SPEL,
DAN DE HEL....**

UNUE LA LUDO. . POSTE L'INFERO

Donacu: konstru-, pentro-, kudrokestojn, pupojn, librojn pri bestoj kaj plantoj, pri malproksimaj landoj, kun fabeloj kaj porinfanaj rakontoj; donacu bildojn kun natur- kaj urbobelaĵoj.

Ne plu longe venenu la koron kaj imagon de viaj infanoj per sento de malamo.

Donacu al ili veran infanĝojon!

La Graveco de la Flandra lingvo.

La lingvaj problemoj kutime interesas la Esperantistaron. Tion ankaŭ rimarkis ia „fuŝisto” en la Septembra numero de „Esperanto” priparolante la vojaĝon al la Budapeŝta Kongreso. Mi opinias utile pritrakti specialmaniere la ĉi-supre menciitan problemon: unue por la Flandroj, kiu tro ofte, kaŭze de la oficiala malzorgado, ne sufiĉe estimas sian lingvon, due por la francemaj renegatoj kaj la Valonoj, kiuj pro tro-grandiga estimo de la franca kulturo malkaŝe forĵetas la Flandran lingvon aŭ eĉ ĝin malamas kaj trie por la alilandanoj, kiuj trompitaj per la ŝtatsciigoj, foje ne akiris precizan scion de la realeco.

Oni preskaŭ ĉie tra la mondo povas aŭdi la Flandran lingvon... krom en la suda duono de Belgujo!

Unue kaj precipe en la samrasa lando, Nederlando, kie ĉiu, de stratbalaisto ĝis reĝino, kie la tuta oficistaro uzas la popolan lingvon. Spite de niaj francemuloj, kiuj ĉiam asertas ke la flandra lingvo nur taŭgas por kuirejservistinoj, en Nederlando oni uzas nian lingvon de la unuagrada lernejo ĝis la Universitato. Ke nia lingvo ne malhelpas la produktadon de scienca verkado, tion pruvas la ok Nobelpremioj, kiujn Nederlando akiris, dum Belgujo akiris du. Estas ĉie sciite, ke la Nederlanda gazetaro estas la plej bona kaj la plej serioza el la tuta mondo kaj ne estas subaĉetebla nek per judmono nek per ŝtataj Judasmoneroj, kiel ĵus okazis ĉe la Franca ĵurnalaro.

Estas ankoraŭ franca Flandrujo, kie spite de la subpremado de pli ol du jarcentoj, ankoraŭ 100.000 homoj parolas flandre kaj estas flandraj; Nord-Germanujo, kie ĉiu komprenas la Flandran lingvon kaj precipe la Limburgan dialekton; Sud-Afriko, kie la enmigrintaj Valonoj, Francoj kaj Germanoj akceptis la lingvon de la pli frue enmigrintaj Flandroj kaj Nederlandanoj; Nederlanda Hindujo, kiu havas 40 milionojn da loĝantoj kaj kie grandaj ĵurnaloj kiel *Java-Bode*, *Locomotief*, *Batavia* kaj *Nieuwsblad* havas cent milojn da legantoj; Okcidenta-Hindujo, trioble pli granda ol Belgujo kaj Nederlando kunigitaj, kie la homoj sin sentas veraj Nederlandanoj; La Antiloj, kie ĉie la Nederlanda estas parolata kaj komprenata; Nord-Ameriko kaj Kanado, kie la Nederlanda havas grandegan influon, kie flandra „van” antaŭ la familia nomo sonas gravege, kie la aristokratoj alte ŝatas la anecon de „Holanda Klubo” kaj kie 28 gazetoj aperas flandralingve redaktitaj.

Brazilio, Ceylano kaj eĉ Japanujo kie ĝis 1868 ĉiuj oficialaj dokumentoj destinitaj por la eksterlandaro, estis redaktitaj nek per la Franca, nek per la Germana, nek per la Angla, sed per la Nederlanda kaj la Japana lingvoj.

Nuntempe en la imperiestra instituto en Tokio (ĉefurbo de Japanujo)

oni instruas la Flandran lingvon pere de Flandra profesoro, D-ro Sobry. Pere de la trafiko de la granda Holanda komercŝiparo, la Nederlanda lingvo ĉie gajnas pli grandan influon. Ekzemple en Port-Saïd, kiu preskaŭ fariĝis holanda urbo. Estas apenaŭ sciite, ke oni uzas sur la granda vaporŝipo *Belgenland* du lingvojn, la Anglan kaj la Flandran. Parte pro nescio, parte pro malbonvolo la Francemuloj rigardas Nederlandon kiel postrestanta lando aŭ ili silentas pri ĝi. Sed je propra belga honto kaj malhonoro ni estas devigataj konfesi, ke la klereco ĉe la ordinara Holanda popolo staras multajn ŝtupojn pli alta ol ĉe la mezvalora Belgo. En la Belga franclingva gazetaro oni nur parolas pri Nederlando por ĝin ataki. Oni silentas pri okazintaĵoj kiel la aervojaĝo de Nederlando al Hindujo; ĉi-tiu vojaĝo tamen estis la duoblo de vojaĝo Belgujo-Kongolandon, pri kiu tie-ĉi oni plenigis tutajn gazetojn. Bedaŭrinde, en Francujo nur estas unu marĉo, kaj en... ĉi-tiun, la Belgaj aviadistoj ĝuste enfalis kaj estis devigataj forlasi la projekton.

La influo de la Nederlanda ne estas malpli granda ol tiu de la Franca lingvo: tamen la francemuloj respektas la Portugezan, la Hispanan, la Danan kaj aliajn malpli divastigitajn lingvojn, sed ne la Nederlandan aŭ Flandran, kvankam oni pli atingas per tiu ĉi lingvo.

La kialo nur estas ilia malamo kontraŭ la Flandraj naciemuloj kaj la Nederlandanoj, kiuj kuraĝas malkovri kaj kontraŭbatali la trompeman imperialistan politikon de Francujo; tion nek kuraĝas nek volas la francemuloj kaj la Valonoj pro nura flatado kaj rampemeco; ili pli preferas leki la manon ilin batantan ol havi sendependan politikon.

Por fini kaj kiel gaja anekdoto, mi volas rakonti la sekvantan rakonton: dum la milito okaze kunestis en kafejo ĉe la fronto, grupo konsistanta el francaja Flandro (el la Norda Francujo) kaj flandra militisto, kiuj interparolis flandralingve; al la grupo aliĝis Bruselano kaj poste Sud-Afrika militisto; poste ankoraŭ Angla militisto kaj Kanadano. Oni rimarkis, ke la tuta grupo komprenis kaj parolis la Flandran: la Sud-Afrikanano estis kamparano el Transvalo, la Kanadano estis la filo de holanda farmisto kaj la Anglo lernis la flandran en Port-Saïd. Nur la Bruselano kun flandra familinomo ne scipovis interparoli kaj miregis ĉar la aliaj ne parolis france!

Lango vane ŝnurita.

La Admirinda Mussolini.

En la holanda gazeto „De Telegraaf” aperis sub la titolo „Spotternij of Sotternij” artikolo kiu klarigas strangmaniere kia granda homo estas Mussolini, kaj kio atendus nin, Flandrojn, se ĉe ni ekregus faŝis-partio.

Kiel subpremita popolo ni senrezerve staras flanke de la Tirolanoj kontraŭ Mussolini.

Ni tie ĉi sekvigas la artikolon, por ke niaj legantoj povu juĝi:

„Zu Mantua in Banden...” (Ekkaptis malamikoj Andreas en montar’.)

Tio estas la nacia kanto de la Tirolanoj kaj rememorigas la tempon, kiam Andreas Hofer estis maliiberigata en Mantua, kie li ankaŭ estis mortpafata.

Denove parto de Tirolo estas „en bantoj” kaj oni nur bezonas fari kelkajn paŝojn surstrate en Bozen, kiu estas italogita je „Bolzano” por senti kaj vidi la subpremon, sub kiu vivas tiuj Tirolanoj.

En tuta tiu germanpensanta kaj germansentanta urbo, ne plu estas videbla unu sola germana surskribo sur la muroj aŭ butikoj. Ĉie itala per novaj oraj literoj kaj sur multaj anguloj kaj stratoj la portreto de „il Duce,” kiu alrigardas vin.

Ĉio kio estas germana kaj tirola estas konstante persekutata. Oni malpermesis en la kafejoj la germanajn proverbojn kaj hotelo en St. Ulrich estis fermata ĉar oni trovis en la kuirejo sur la varmakvokaldrono la vortojn: „Heiszes Wasser.” Kaj ne nur la germanaj surskriboj devis malaperi, sur la malplena loko oni devigis meti italajn! Alia hotelo estis fermata, kvankam ĝi bone plenumis la ordonon: „En la manĝoĉambro la fotografaĵo de la reĝo,” sed ĉar oni ne estis enkadriginta ĝin!

Leteroj kun germana adreso kaj senditaj de en la enlando ne estas liverataj kaj estas ordonite, ke lettersurskriboj kaj surskriboj de fakturoj kaj aliaj de firmo elirantaj paperoj devas esti redaktitaj en Itala lingvo.

En 1926 leĝo estis publikigata per kiu ŝtatanoj, kiuj per la paco de Saint Germain iĝis Italaj burĝoj, povas esti deklarataj kiel senigitaj de siaj burĝrajtoj, kiam la estraro juĝas ilian politikon malinda. Tiamaniere oni havas la eblon malebligi la estadon al politikaj kontraŭstarantoj.

Alia ordono devigis la italogon de propraj nomoj.

Oni efektive jam komencis per la nomoj de ĉiuj ŝtatoficistoj.

Tiamaniere oni regule povas legi en la ŝtatgazeto, ke la familio „Müller” propravole — okazas „propravole” kun la tranĉilo sur la gorĝo — ŝanĝis sian nomon en „Mugnalo,” kaj la familio Rainer, la sian en „Raineri.”

La koloroj de Tirolo estas blank-ruĝo. Multaj domoj kaj vilaoj estas pentritaj per tiuj koloroj, malpli pro naciemo ol ĉar tiuj koloroj estas allogaj kaj freŝaj.

Depost la Itala superregado estas malpermesate pentri sian domon blank-ruĝa. Kaj novaj konstruaĵoj prefere devas esti konstruataj en Itala renesanca stilo.

La urbestro de Abtei estis eksigata ĉar li unufoje elpendigis la tirolan fiagon. Tiu de Graunn ĉar li ne vidigis sin dum Itala venkfesto, kaj tiu de Burgthal ĉar li ne kapablis malebligi privatan germanan lernejon en sia vilaĝo.

La prefekto Ricci de Bozen publikigis en novembro 1927 ordonon: Tombsurskriboj post la 30a. de septembro devas esti redaktataj en Itala lingvo. Oni eĉ intencis malpermesi la Kristnaskarbon je Kristnasko, sed tion oni tamen ne jam kuraĝis fari.

La pastraro estas perforte italgata, kaj ĉie kie estas eble, la italaj pastroj anstautaŭigas la germanajn.

La instruado estas donata pli kaj pli en la manojn de italaj instruistoj. La infanoj estas instigitaj aliĝi al faŝistaj infanunuiĝoj; la Germanaj Ginnaz- kaj kantonuiĝoj estis disigitaj kaj la mono ŝtelata. La sub-urbestro de Brizen estis enkarcerigata dum ses monatoj, ĉar li forstrekis portreton de Mussolini de sur sia dompordo.

Unu el la devizoj de Mussolini estas:

„La ŝtato estas la karabinisto kaj la sinjoroj sin konduitu laŭ tio.”

Ĉie en la vilaĝoj ili estas estroj kaj kun la juĝasignistoj ili estas la tiranoj de la tuta kamparo.

Oni devigas enpumpi en la infanojn la sekvontajn tezojn:

1) Italujo estas la lando, kiu meritas esti la plej granda kaj la plej forta.

2) Italujo iĝos la plej granda kaj la plej forta lando de la mondo.

3) Italaj leĝoj estas la plej perfektaj de la mondo.

4) La ŝtatoj de Italujo estas la plej bonaj kaj tial oni ŝuldas al ili: obeemon kaj estimon.

SUBTENO POR NIA REVUO.

Johĉjo, 100.—; ĉiumonate: Vercauteren, 10.—; Eulaers, 10.—; Théry, 10.—; Pittoors, 10.—; Jan, 10.—; Mart, 10.—; Zus, 10.—; Fik, 10.—; G. T., 10.—; Jef, 10.—; Piet, 20.—; entute: 220.— fr.

Internacia Esperanto-Muzeo, Wien.

La plej grava sukceso en nia movado laŭ la opinio de prez. Merchant kaj la aliaj eminentuloj estas la fondo de „Intern. E.-Muzeo en Wien.”

La nova adreso de la muzeo estas: Intern. Esperanto-Muzeo, Wien, I. Augustinerstrasse, 7.

Ni instigas niajn legantojn kaj amikojn je alsendo de ĉiuspeca materialo (libroj, broŝuroj, gazetoj, insignoj, fotografaĵoj, ktp.). Ĉiu ricevos oficialan dankleteron kun kvitanco pri la alsendita materialo.

Ni ankaŭ instigas ilin fariĝi membroj de I. E. M. W. Kotizo por 1929/1930: Sv. f. 1,20, sendeblaj per respondkuponoj internaciaj aŭ de U. E. A. Ili ricevos membrokarton. Krome la donacintoj de materialo kaj la membroj ricevos *senpage* du belajn gvidfoliojn ilustritajn..

La listo de la donacintoj estos publikigata en la gazetoj.

Subtenu I. E. M. W. vi per tio helpos la esperantan movadon!

Aŭstria kanceliero ĵus donacis al la muzeo S. 200.—!

Neprilaborita Fruktozona Kampo por la Flandraj Esperantistoj.

Sendube la plimulto el la Flandra popolo estas kontraŭmilitema, estas flandrema. Ekzistas i.a. asocio, kiu meritas precipe nian atenton, ĉar ĝi kiel ni batalas por „Libera Flandrujo en paca mondo,” ĉar ĝi estas kontraŭmilitema kaj, laŭ ĉi tiu lasta vidpunkto, jam ofte interfratiĝis kun eksterlandaj samopiniantoj. Tiu asocio estas V. O. S. (Vlaamsche Oud-Strijders, t.e. Flandraj Eksmilitantoj).

Por montri al la Flandraj samideanoj la veran spiriton, kiu regas en tiu rondo, mi tradukas kelkajn frazojn el la parolado de D-ro De Pilicijn okaze de la 9 a. pilgrimado (en 1928) al la Flandraj mortkampoj ĉe l'Izero. D-ro De Pilicijn parolis kiel deligito de V. O. S. kaj diris i.a.:

„Ni staras meze de ĉia batalbruo: batalbruo en Flandrujo por la kulturaj rajtoj de nia propra popolo, batalbruo en ĉiuj landoj kie estas kazernoj kaj politikistoj kaj financistoj por plenigi la kazernojn. Kaj kvankam la spirita bezono de nia popolo estas doloriga, kvankam nia sango senpacience fluegas, kiam ni vidas la malrapidecon per kiu la popolo estas helpata de ili, kiuj sin nomas ĝiaj gvidantoj, tamen nia orelo unue aŭskultas tiun batalbruon, en kiu la militelokvento antaŭiras la militan krimon.

En la vicordo de nia maltrankvilo staras unue la prizorgo pri la sorto de milionoj da homoj, kiuj estas ekzercataj pro defendaj (?) celoj, kun defendaj kanonoj kaj defendaj generaloj. Ĉu ne estas sekve de la Flandra movado, ke ni lernis estimi la popolekziston, ke ni lernis malami la egoismon de la kasto kaj ami la justecon? Ĉu ne estas logike, ke ni metas, kiel unua fakto de nia idealo, la internacian estimon kaj amon kontraŭ la internacia mensogo kaj kasta spirito?

Antaŭ ni la milito aperis tiel monstra, tiel terura, tiel senmorala kaj nepravigebla, ke ĝi ĉiam denove antaŭ ĉio leviĝas en nia spirito, tiel forte, ke ni kreskis ekster la limojn de nia Flandra patrujo en la patrujon, kiu estas nomata la homaro.

Multaj el ni sentas en si la bezonon pentofari pro la parto, kiun ili havis en la lasta krimo kontraŭ la homaro. Nia koro ne sentas tion, ĉar la rezulto de la milito estis tute ne laŭ la faritaj promesoj, sed ĉar ni estis ilo de mensogo, malamo kaj egoismo, kaj ĉar ni volas eviti al la mondo tion, kion ni mem estas suferintaj.

La Flandraj eksmilitantoj ne estas tiaj, kiaj tiuj ŝtatestrestranoj aŭ militestrestranoj, kies noktoj ne estas pli maltrankvilaj, ĉar kvindek mil homoj mortis je ilia prirespondeco. Dum la horoj de soleco, kiuj kon-

dukas la animon al si mem kaj al Dio, ili vidas la korpojn disfenditajn kaj la detruitajn animojn, la sangon, kiu servis kiel komercaĵo kaj kiel temo por parlamenta retoriko.

Ili vidas la popolojn senhonte trompitaĵ.

Estas konsciencia devo por la Flandraj eksmilitantoj daŭrigi seninterrompe, senkondiĉe kaj tutsindone batalon kontraŭ milito kaj milit-eblo en ĉiuj ĝiaj formoj kaj ĝiaj sekvoj.”

Ĉu tiu parolado ne klare montras, ke la Flandraj esperantistoj trovas ĉe la Flandraj eksmilitantoj esperplenan, fruktodonan kampon por semi la semerojn de la Esperantismo? Ĉu ne estas certe, ke tiuj ĉi duon-samideanoj iĝos tute niaj samideanoj, kiam super iliaj flandra kaj kontraŭmilitema idealo brilos la kara verda stelo? Pol VARENS.

DIVERSAJOJ.

— Ni ricevis de Holanda amiko la numeron 1 (Tria epoko) de *Kataluna Esperantisto*, kies direktoro estas... Jozefo Anglada. Ni tute ne fidus tiun Katalunan Esperantiston, kiu tute ne similas la antaŭan laŭ aspekto kaj enhavo, kaj konjektas, ke ĝi kaŝas iun ruzon. Niaj Katalunaj amikoj nepre informu nin.

— Belgujo havis la plej grandan nombron da ŝtatoficistoj jam en 1914: 200 por 10.000 enloĝantoj, dum Nederlando havis 168, Francujo 162, Svisujo 142, Germanujo 138, Italujo 136, Anglujo 73. Depost la milito tiu nombro ankoraŭ pligrandiĝis en Belgujo.

— La Belga Laborista Partio havas nuntempe 800.000 pagantajn membrojn.

— La granda flandra faka revuo *Radio* ege simpatias kun nia movado. Estas la devo de ĉiu flandra esperantisto-radiisto aboni tiun bonan revuon.

— Adresojn de fidindaj firmoj, liverantaj lanaĵojn (pull-over, k.t.p.) kaj tapiŝ-ŝtofojn („moquette”) donas S-ro Van Ghendt, sekretario de „Al Triumfo,” Wegvoeringstraat 75, Sta. Nikolao, Belgujo. Sta. Nikolao estas la paradizo por tiuj artikoloj.

— La 22a. *Universala Kongreso de Esperanto* okazos de la 2a. ĝis la 9a. de Aŭgusto 1930 en *Oxford* (Anglujo). La kotizo estas por ni Flandroj 175 belg. fr. ĝis la 1a. de Julio; post tiu dato la kotizo estas 262.50 fr. ! Serioze !

— En *Sennaciulo* (no. 262) Satano 13066 donas kelkajn pravajn korektigajn informojn al K-do L. Bergiers, kiu verkis artikolon pri la Flandra Movado, post kiam li estis ĉerpinta sian saĝecon el la belga faŝista gazetaro ! K-do Bergiers estas Bruselano: tio klarigas multon !

— La afero de la *Viena deficino* (1924) ne jam estas en ordo. Gesinjoroj P. Blaise, Bonveno, 47 Manor Way, Headston, N. Harrow, Mdx, Anglujo, dissendis *Gravan Alvokon* pri tiu afero *Al la tutmonda Esperantistaro*, kiun ni bedaŭrinde pro manko de loko ne povas represii. Helpemaj samideanoj sendu sian donacon al la supre menciita adreso.

Esperanto door Zelfonderricht.

5^e LES

VERTALINGEN DER VIERDE LES

Traduko. — D-ro Van de Perre mortis en Antverpeno la 4 an. de Aŭgusto 1925. Karel Ledeganck naskiĝis en Eecloo la 9 an. de Novembro 1805. Mi aĉetis tri kilogramojn da sukero kaj unu kilogramon da kafo. Marto estas la tria monato de l'jaro. Mi estas la kvara, Frederiko estas la sepa kaj Karlo estas la lasta de nia klaso. Semajno estas la kvindekduona parto de jaro. Julio estas la sepa kaj Decembro la lasta monato de la jaro. Ĉi tio estas nia dua botelo da vino. Dimanĉo estas la unua tago de la semajno. Venu marde aŭ vendrede. Estas hodiaŭ la unua de Novembro. Ĉu vi havas la sesan parton? Ne, sinjoro, mi havas la okan. Dudek estas la duono de kvardek. Kiom estas du trionoj kaj tri dekonoj? Mi iras Bruselon (of: al Bruselo). Li laboris nur kelkajn semajnojn (of: dum kelkaj semajnoj) dum la tuta jaro. Mi aĉetis tri metrojn de tiu ŝtofo; ĝi kostis kvindek frankojn (of: po kvindek frankoj) por metro. Disiru! En la arbaro loĝis bela feino.

Vertaling. — In den Zomer sta ik op om zes uur. De pare getallen van één tot tien zijn: twee, vier, zes, acht en tien; één, drie, vijf, zeven en negen zijn de onpare. Hoeveel is drie-en-zeventig en tien? Dat is drie-en-tachtig. De maand Februari heeft slechts acht-en-twintig dagen of negen-en-twintig in een schrikkeljaar. Zeg mij welke de vijfde maand van het jaar is en welke de negende. De vier jaargetijden zijn: lente, zomer, herfst en winter. Op welken dag is Kerstmis? Paschen is in Maart of April, Sinksen in Mei of Juni. Waar zijt gij? Waarheen gaat gij? Den 11n November werd het vredesverdrag onderteekend. De oorlog duurde meer dan vier jaren, bijna vijf. Het abonnement van ons tijdschrift kost slechts tien frank; dat is goedkoop. De vogels vlogen uiteen. De Brusselaren spreken noch Fransch, noch Vlaamsch.

De VERGELIJKENDE TRAP wordt gevormd door *tiel... kiel*: Mi estas tiel granda kiel vi; — hundo kuras tiel rapide kiel kuniklo (konija).

De VERGROOTENDE TRAP door *pli... ol* of *malpli... ol*: Mi estas (mal)pli granda ol vi; — hundo kuras (mal)pli rapide ol kuniklo.

De OVERTREFFENDE TRAP wordt gevormd door *(la) plej (el)*: Mi estas la plej granda (el ĉiuj); — hundo kuras plej rapide (el ĉiuj bestoj).

Indien men slechts twee dingen vergelijkt, dient (zooals in het oud-Vlaamsch) voor de overtreffende de vergrootende trap gebruikt: Brueghel la pli juna (Brueghel de Jongere).

De VOLMAAKT OVERTREFFENDE TRAP wordt gevormd door *tre*: Mi estas tre granda.

— Het voorvoegsel *ek* dient om het begin eener handeling of een handeling van korten duur aan te duiden: ekdormi, insluimeren; ekkrii, uitroepen; ekkanti, beginnen te zingen.

Het voorvoegsel *re* duidt herhaling of terugkeer aan: reveni, terugkomen; relegi, herlezen.

— Het achtervoegsel *ebl* beteekent mogelijkheid: eble, misschien; legebla, leesbaar.

Het achtervoegsel *em* neiging voor iets: lernema, leerzaam; flandrema, vlaamschgezind.

Vertaal. — Deze rivier is diep, maar dat meer is dieper. Wie is sterker, Karel of Frederik? Karel is sterker, hij is de sterkste van ons allen. Welk metaal is het nuttigst? IJzer is het nuttigst metaal. Johan is even groot als Willem. Deze dokter is zeer geleerd. Europa is kleiner dan Azië. In de lente zijn de dagen korter dan in den zomer, maar in den winter zijn zij het kortst. De Spaansche wijnen zijn de beste. Mijn broeder is grooter dan ik, maar ik ben de oudste. Het huis is breed en de straat is smal. Is de deur even hoog als het venster? Neen, het venster is lager. Zilver is kostbaarder dan koper. Zij begon luid te weenen. Herbegin! Herlees! Mogelijk zal ik u spoedig weerzien. Hij is leugenachtig en niet leerzaam.

WOORDENLIJST (raadpleeg zoo noodig de vorige woordenlijsten): deze, ĉi tiu; rivier, rivero; diep, profunda; dat, tiu; meer, lago; sterk, forta; of, aŭ; allen, ĉiuj; welk, kia; metaal, metalo; nuttig, utila; ijzer, fero; dokter, kuracisto; geleerd, klera; Europa, Eŭropo, Azië, Azio; Spaansche, hispana; wijn, vino; oud, maljuna; breed, larĝa; deur, pordo; zilver, arĝento; kostbaar, multekosta; koper, kupro; luid, laŭte; weenen, plori; beginnen, komenci; leugen, mensogo.

Traduku. — Ĉi tiun aŭtunon ni havos tiel belajn fruktojn kiel la pasintan jaron. La plej bona virino ne indas la plej malbonan viron, la popolo diras. Tiuj junuloj estas tre laboremaj, sed la malgranda Johano estas la plej laborema. Mia kuzo estas tiel juna kiel mi. La turo de la antverpena ĉefpreĝejo estas la plej alta el Flandrujo. Ni venis piede de Liero kaj estis tre lacaj. Tuj kiam mi estis en mia lito, mi ekdormis. Rubens estas tre fama flandra pentristo. Tiu traduko estas pli malfacila ol ĝi ŝajnas. Via domo estas pli alta ol (la) mia. Ĉu vere (la) mia estas la pli malalta? Mi havas pli da mono ol mi pensis! Subite mi ektimis. Mi revidis mian tutan vivon kaj ekpensis pri ĉio, kion mi travivis.

WOORDENLIJST: frukto, vrucht; pasinta, verleden; indi, waard zijn; popolo, volk; junulo, jongeling; turo, toren, ĉefpreĝejo, hoofdkerk; Flandrujo, Vlaanderen; piede, te voet; laca, vermoeid; fama, beroemd; pentristo, schilder; ŝajni, schijnen; vere, waarlijk; subite, plotseling; timi, vreezen; vidi, zien; pri, over; ĉio, alles; kio, wat; travivi, doorleven.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”).

Dr. Aug. Borms vóór 't Gerecht (D-ro Aŭg. Borms antaŭ la Juĝistaro). — Eld. Ern. Sele, Prinsesstraat, 11, Antwerpen. 436 paĝoj. 14x22 cm. Prezo: Bfr. 28,—.

Nova eldono de la stenogramo de la „Bormsproceso” estis necesa, ĉar la unua eldono estis tute elĉerpita. La nova eldono, kompilita de M^o Ed. Schiltz, ne nur enhavas, kiel la unua, la kompletan stenogramon de la akuzo, enketoj, atestoj, pledadoj kaj mortkondamno, sed ankaŭ detalan biografion de la granda Flandro, D-ro Borms, historio pri la postmilita belga teruro, la subteno por Borms kaj la persekutitaj Flandroj, la amnestimovado, la elektado de Borms por la Parlamento, lia liberigo kaj fine la reviviĝo de la flandra movado sekve de lia forofero.

Multaj fotoj ilustras la libron, i.a. de la atestantoj Cyriel Verschaeve, Edmond Picard, Roza De Guchtenaere, de la granda popolmanifestado de la 3a. de Februaro 1929, k.t.p.

La libro estas necesa al ĉiu, kiu sekvas la historion de la Flandra Movado. Niaj flandraj kaj nederlandaj samideanoj pripensu tion!

J. v. S.

La Leono de Flandrujo de Hendrik Conscience, el la flandra lingvo tradukis H. J. Bulthuis, L. K. Rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. 312 paĝoj 16x20 cm. Prezo: broŝ. 47,— fr., bind. 54,— fr.

Nia nederlanda samideano Bulthuis, kiu ne nur pro la kvanto, sed ankaŭ pro la kvalito, estas je la nuna momento la plej merithava el la esperantaj aŭtoroj, mirigis la samideanaron, kaj precipe kaj plej agrable el ĝi la Flandrojn, per la apero de traduko de „La Leono de Flandrujo,” la rekonita ĉefverko de Conscience.

Mi ne parolos pri la enhavo de la libro mem: ĉiuj veraj Flandroj konas ĝin; multaj el ili (almenaŭ mi!) flandremiĝis dum sia unua juneco per ĝi.

Pri la traduko mem, mi ne trovas en mia vortaro la deziratajn esprimojn por laŭdi la gigantan laboron de Bulthuis. Antaŭ tia verko oni admirante silentas, oni nur ĝuas...

Mi konfesas, la prezo de la libro estas sufiĉe alta por ni, Flandroj. Sed, ke la grupoj almenaŭ donu la ekzemplon, ke ili aĉetu la libron; la membroj, kiuj estos trafoliantaj ĝin, volos ĝin posedi.

Bulthuis, korajn gratulojn! Sinceran dankon nome de la Flandroj!

J. v. S.

RICEVITAĴ REVUOJ

Schola et Vita, 8-9; Holanda Esperantisto, 94, 95, 96; Internacia Stenografiisto, 31; Oomoto Internacia, 35a; La Unuigita Tuthomaro, 3, 4, 5; Esperanto-Nippon, 1-6; Utrechta Esperantisto, 10; Breiz Atao, 72, 73, 74, 75; International Language, 6; British Esperantist, 295; Barcelona Stelo, 12; Antaŭen, sept.; Espero Katolika, 67,68; Dordrechta Esperantisto, 10; Informoj de E. A. E., 92-93; Sennaciulo, 266; Internacia Medicina Revuo, 6; Svenska Esperanto-Tidningen, 11; Bulteno de A. P. P. K., 5; Bulgara Esperantisto, 1; La Progreso, 9-10; Marto, 11; Germana Esperantisto, 11

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !
ABONNEERT U
op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Esperantistoj, atentu !

En la venonta monato, je la datreveno de la naskiĝtago de D^{ro} Zamenhof (15 Decembro) revenos ankaŭ

ESPERANTO-LIBRO-TAGO

kun la honordevo de ĉiu vera Zamenhof-ano, aĉeti E-librojn kaj per tio helpi la E-editistojn en ilia pionirlaboro por la E-afero.

Aĉetu do ĉe „*La verda Velo*”, Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen, poŝtĉeko 173509, aŭ ĉe „*Flandra Esperanto-Instituto*”, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen, poŝtĉeko 242703, la belegajn librojn ;

AMO KAJ POEZIO, originala poemaro de *Jan van Schoor*.

LA DU AMATINOJ kun LA KAPRICOJ DE MARIANO de *Alfred de Musset*, tradukitaj de *Jan van Schoor* kaj rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Ĉiu verko kostas nur po 10 BELG. FRANKOJ (2 BELGOJ).

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet

Goede bediening.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.